



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio  
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jara n-ro 11

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.  
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

## GEOGRAFIAJ NOMOJ EN ESPERANTO

Ĉe tiu ĉi temo oni verŝajne pensas unue pri la nomoj de landoj. Tamen, la esperantigo de landnomoj estas tiom tikla kaj diversaspekta afero, ke ĝuste tiujn nomojn mi prefere ne prikraktos en tiu ĉi artikolo. Ĉiu nova sugesto aŭ eĉ nur aludo pri tio povas nur pligrandigi la haoson en kiu ni tiurilate jam troviĝas. Ekzistas naciaj, grupaj kaj individuaj preferoj pri kiuj oni ne povas aŭ ne volas veni al interkonsento, precipe la konkurenco inter *lando*, *ujo* kaj la ne oficiale agnoskita *io*. Krome okazas kelkfoje ŝanĝoj de nomo, estiĝas novaj ŝtatoj. La unueco do estas ankoraŭ malproksima.

Sed la grandan plimulton da geografiaj nomoj formas la nomoj de maroj, lagoj, riveroj, provincoj, departementoj, kantoj, aŭtonomaj ŝtatoj kiel en Sovetio kaj Usono, montoj, montaroj, kaj precipe la grandega nombro da urboj kaj vilaĝoj.

Antaŭ ĉio gravas la demando: ĉu ni sentas bezonon traduki ĉiujn ĉi nomojn? Tio dependas de ilia pli-aŭ-malplia internacia graveco aŭ konateco. Pri oceanoj kaj maroj ne ekzistas dubo ĉi koncerne. Same kiel ŝtatoj ili bezonas tradukon, kvankam ne regas unueco inter la jam ekzistantaj tradukoj, ekz. Atlantika Maro aŭ Atlantiko, Baltika Maro aŭ Baltiko. Riveroj kiel Rejno kaj Danubo, fluantaj tra diversaj landoj, kie iliaj nomoj ne estas egalaj, montoj, montaroj kun internacia

aŭ historia graveco, kiel Alpoj, Pireneoj, Himalajo, nepre bezonas konvenan tradukon ankaŭ en Esperanto.

Por la granda nombro da riveroj kaj riveretoj fluantaj tra nur unu lando, kaj havantaj preskaŭ ĉiuj nur unu propre nacian nomon, kiel Eem, Seine, Loire, Ural k.m.a., ni certe ne bezonas serĉi Esperantan nomon. Tio kaŭzus nur miskomprenojn kaj konfuzojn.

Ian embarason kaŭzas la nomoj de provincoj, de ŝtatoj en ŝtatumoj kiel Sovetio kaj Usono, ĉar inter ili ekzistas pluraj kiuj havas historian gravecon aŭ kiuj mem iam estis aŭtonomaj ŝtatoj. Laŭ tio oni sentas bezonon traduki ilin, ekz. Frislando, Flandrio (aŭ ujo), Burgundio, Tracio, Ilirio, Kastilio, Ukraino, Lombardio. Tiel oni povas paroli ankaŭ pri Kalifornio, Nov-Jorko. Sed la embaraso estiĝas kiam oni devas menciigi kelkajn tiajn ŝtatojn aŭ provincojn kune. Tiukaze estus ridiĝe menciigi unuŝpire aŭ unufraze Frislando kaj Overijsel aŭ Kalifornio kaj Massachusetts, Genevo kaj Graubünden. En tia kazo mi persone preferas traduki neniu el ili.

La geografiaj nomoj kiujn ni plej ofte el ĉiuj uzas, certe estas la nomoj de urboj kaj vilaĝoj. Preskaŭ ĉiuj eŭropaj ĉefurboj havas krom sia propre nacia nomo ankaŭ nomon en aliaj lingvoj, ekz. London, Londen, Londres, Londyn. Do, se al tiu

plurnomeco ni aldonas ankaŭ nomon en Esperanto, tio neniel ĝenas. Estas tamen rimarkinde ke ĉeĥoj preskaŭ neniam parolas pri Prago, verŝajne por eviti miskromprenon pro la pola urbo Praga. Kvankam la o-finaĵo ne estas al ili fremda - la vokativo de Praha estas Praha - ili tamen neniam tradukas tiel.

Kutime oni parolas pri tradukoj, sed en vero la pli multaj esperantigoj de geografiaj nomoj ĝustedire ne estas tradukoj, sed transmetoj de la nomoj en Esperantan ortografion, do transliteracioj. Ni limigu nin al kelkaj nederlandaj ekzemploj Amsterdamo, Roterdamo, Harlema, Hago, Nimego, Utreĥto. La lasta formo strange impresas al ne-esperantistoj, pro la litero ĥ. Ĝis nun mi trovis nur unu veran tradukon: Boskoduko por 's-Hertogenbosch, kaj tiu eĉ estas ridiga kreaĵo el la franca Bois-le-Duc.

Nur tre malmultaj loknomoj permesas veran tradukon, ekz. Driebergen, Tienhoven, Zevenhuizen, Bergen, Koewacht, Monnikendam, sed oni tuj konstatas ke pri veraj tradukoj neniam povas esti parolo. Do ne estas mirige ke oni ĝenerale kontentiĝas per transliteracioj. Sed ankaŭ tio ofte ne estas farebla, almenaŭ se oni ne volas riski kreon de ridige aspektantaj formoj. Tio estas sendube la kaŭzo pro kiu oni nur malofte trovas esperantigitajn nederlandajn loknomojn. Nemultaj nomoj estas tiel facile esperantigeblaj per aldonado de la o-finaĵo kiel ekz. Amsterdam(o).

Specialaj malfacilaj kaŭzas la transliteracio de francaj kaj anglaj nomoj, ĉar la franca kaj angla ortografioj estas tre malsimplaj, ofte neklaraj kaj precipe nepraktikaj, pro kio la produktoj de tia transliteracio estas ne- aŭ preskaŭ nerekoncible. Kiel ekzemple ni esperantigu Beauvais, Charleroi, Lausanne, Bourne-mouth, Gloucester, Wight. Mi ne aŭdacas esperantigi! Mi menciis nur kelke da ekzemploj trovitaj en iu Esp.-revuo: Serbruko, Kalgario, Kebeko. Kaj en unu sama rubriko oni legas ankaŭ neesperantigitajn nomojn: Drummondville, Cap-de-Madeleine, Vancouver, kaj krom Shwinigan ankaŭ Ŝavinigana.

Skribante pri ortografio kaj prononco de fremdaj geografiaj homoj en la revuo „Onze Taal”, iu kunlaboranto atentigas ke kontentiga transliteracio ne ekzistas. Kiel ekzemplon li mencias la rusan ur-

## ASOCIAJ INFORMOJ

VOJO LONGA . . .

### SED PLUIRADO KONSTANTA

Multaj esperantistoj opinias, ke la sukceso de la Esperanto-movado dependas de la registaraj aŭtoritatoj. Eble ili ne tute pravas. Dum ĝiaj 80-jaroj de ekzistado la Esperanto-movado konkeris poziciojn en la socia vivo, kiu garantias al ĝi sekuran estontecon. La konkero de tiuj pozicioj ne estas dankenda al la oficialaj instancoj, sed ja al la laboremo, persistemo kaj oferemo de la laborantoj por la ideo de internacia lingvo.

Tamen, ni devas rekonii, ke ĉiu apliko de Esperanto en la praktiko fare de la registaraj instancoj grandmezure helpas nian laboron en la disvastigado de Esperanto. Tial ni devas ĉiam ĝoji kaj esti dankaj kiam iu ministerio en kiu ajn lando decidas uzi ankaŭ Esperanton flanke de aliaj (rekonitaj kiel valoraj) lingvoj.

Unu tia decido estas farita antaŭ nelonge de la Nederlanda Ministerio por Eksterlandaj Aferoj per eldono de fotolibro pri Nederlando, kun multaj informaj faktoj. Kiel kondiĉo por la eldono de tiu ĉi libro la Ministerio postulis, ke la Esperanto-movado prenu sur sin la respondecon de la vendado de 3000 ekzempleroj.

Pro la graveco de tiu ĉi entrepreno nia estraro opiniis ke ĝi devas nepre efektiviĝi kaj akceptis preni tiun respondecon. Por evidentiĝi la gravecon de tiu ĉi eldono ni citu, ke la nomita Ministerio poste decidis ankaŭ eldoni broŝurojn kaj faldfoliojn en Esperanto. Krome, plej laste la Ministerio decidis aldoni al siaj vizitkartoj ankaŭ tekston en Esperanto, flanke de kvin gravaj naciaj lingvoj. Tiuj vizitkartoj estos uzataj en ĉiuj nederlandaj ambasadorejoj en la mondo, do vi povas kompreni, ke tio tute certe altigos la prestiĝon de Esperanto.

Tiuj ĉi sukcesoj estas ŝuldataj al la agemo de s-ino Kervers.

Pro tio koran dankon al ŝi.

La prezo de ĉi tiu vere tre bone prizorgita eldono sumiĝas po 3,50 gld.

Ĉiuj sekcioj ricevos ekzempleron, tiel ke ĝiaj membroj povos havi antaŭe impreson pri ĝi.

Estas dezirinde, ke la sekciaj sekretarioj transdonu la kolektitajn mendojn de siaj membroj al la ĝenerala sekretariejo por faciligi la ekspedon kaj ŝpari kostojn.

## URĜA ALVOKO al ĉiuj Esperanto-grupoj en Nederlando, kaj individuaj membroj.

Estimataj gesamideanoj,

Ĉar montriĝis ke la propagand-metodoj, kiujn ni ĝis nun uzis, tute ne sufiĉas kaj ke la rezultatoj preskaŭ ĉiam estas nekontentigaj, la Groningena grupo „La Verda Stelo” klopodos trabori ĉi tiujn eluzitajn metodojn.

La vidpunkto de nia grupo estas ke unufoja grandskala agado donos al ni pli efikan rezulton ol la ĝis nun farita propagando de la diversaj grupoj aparte, kiu kostas ankaŭ multe da mono kaj efikas, ke la Esperantistaro en nia lando malpli-grandiĝis.

Nia intenco estas aranĝi televid-kurson pere de „Teleac”, kies kursoj montriĝas tre allogaj por la nederlanda popolo. Tion pruvas la ĵus komenciĝinta kurso en la rusa lingvo. La nombro da partoprenantoj en ĉi tiu kurso estas tiel granda, ke en kelkaj tagoj la tuta stoko de la lernolibroj estis elvendita kaj nova provizo estas presota.

Ni provizore taksas la kostojn por tiu „Teleac”-kurso je f 10.000,—. Por akiri tiun monsumon ni petis al niaj membroj garantisumon, kiu poste, kiam sufiĉe da lernantoj anoncos sin, estos repagata.

La entuziasmo inter niaj klubanoj estas tiel granda, ke ni povas jam nun garanti

pli ol f 2.000,—.

Ni urĝe petas al vi entuziasmigi viajn membrojn por kunlabori en ĉi tiu agado kaj - ĉar la tempo urĝas, por ke ni povu komenci en la venonta sezono kun la suprenomita kurso - ni petas al vi ensendi vian respondon antaŭ la 30-a de novembro de ĉi tiu jaro.

Vi do ne ankoraŭ bezonas sendi monon, sed nur informi nin kion vi opinias pri ĉi tiu plano kaj krome komuniki kiom da mono vi povos garanti, ĉar tio estas la ĉefa punkto de ĉiu agado.

La provizora celo de nia agado estas nur ekzameni ĉu la nederlandaj Esperanto-grupoj estas pretaj kunlabori kaj ĉu ili estas kapablaj kolekti sufiĉe grandan garantisumon. La postajn agadojn ni intencas transdoni al F.E.N.

**GESAMIDEANOJ, VEKIĜU!!**

Kaptu la unikan okazon per kiu ni povos atingi la tutan nederlandan popolon.

Samideane salutante nome de la Groningena Esperanto-klubo „La Verda Stelo”, via

N. C. Kuiterman-van Goor,  
sekr.ino.

Bosboom Toussaintstraat 21,  
GRONINGEN.

Generalaj membroj povas mendi la libreton rekte ĉe la ĝenerala sekretariejo.

La aganta prez. de LEEN,  
J. Calado.

### ATENTU!

**Mendoj ĉe la sekretariino kun samtempa pago al la kasistino:**

**S-ino W. P. Lok - van Putten, SANT-POORT-Z., ĝir-numero 3 45 63, je la nomo de:**

**Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., SANTPOORT.**

### Peto de la Pola Radio

Nia estraro ricevis peton de la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio kompili sonbendon per la voĉoj de niaj aktivuloj, kiuj tiel informos la polajn Esperantistojn pri la Esperanto-movado en nia lando.

Rekompence la Pola Radio resendos la sonbendon kun Esperanto-kanzonoj kaj alia materialo, utila por uzi en klubvesperoj.

Kiu el niaj aktivaj sekcioj volas sin okupi per ĉi tiu laboro? Jen bela rimedo por internacia kontakto kaj disvastigo de nia lingvo!

Listo kun demandoj, teknikaj aranĝoj kaj tiel plu estas havigebla ĉe la dua sekretario, R. Slot, Ernst Casimiriaan 21, Zeist.

*Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkita en Esperanto.*

*La Redaktoro.*

## EL LA SEKCIOJ

### FRISA ESPERANTISTA RONDO.

*Sekr.: Goutumerdijk 18, Leeuwarden.*

La 15an de septembro vizitis nian rondon Prof. D-ro J. M. Mablesone, kiu en la daŭro de la jaroj nun jam por la tria fojo prelegis pri Brazilo, sia dua hejmlando. Nun la temo estis „Norda kaj suda Brazilo”. Urboj kaj pejzaĝoj aperis sur la ekrano; ni interkonatiĝis kun la riĉaj faŭno kaj floraro kaj ĝuis la agrablan rakontadon de nia gasto. Ni esperas ankoraŭ ofte revidi kaj reaŭdi lin dum liaj venontaj feriaj restadoj en Nederlando.

### SEKCIO ZAANDAM

*Sekr.: P. L. Takstraat 64.*

La estraro kaj la redaktoro de nia klubgazeto intencas eldoni la sekvontan gazeton en la monato decembro. La kunlaboro de ĉiuj anoj estas petata por raportoj pri si mem kaj pri la renkonto kiun oni havis kun eksterlandaj gesamideanoj. La raportojn oni povas doni al la redaktoro aŭ ties anstataŭanto dum la novembro distra kunveno kiu okazos lundvesperon la 13-an de novembro je la oka horo en la salono numero unu de Doopsgezind Weeshuis, Stationsstraat 6.

### AGADO E 3

En la kadro de la esperantista agado E3 (vidu „N.E.” de aprilo 1967), celanta okulkuracan helpon al blinduloj en afrikaj evolulandoj, s-ro J. A. Tuinder, iniciatinto de tiu agado, decidis eldonigi kaj vendigi du seriojn da bildkartoj.

La ok kartojn oni povas mendi ĉe la adreso de la Agado: Van Hulststraat 1, TER APEL (Nederlando) kontraŭ sumeto de ned. guld. 2,50 (ĝirn. 102 01 00, J. A. Tuinder, TER APEL) aŭ ses internaciaj respondkuponoj.

La temoj de la du serioj de po kvar kartoj estas: „Originala Afrika Arto” kaj: „Afrikaj Infanoj”. La kartoj havas esperantan kaj nacilingvan tekstojn.

Ĝis nun la tutmonda esperantistaro kolektis por la D-ro L. L. ZAMENHOF-KLINIKO preskaŭ ned. gld. 7.000,—, sed la kliniko kostos ĉ. 25.000,—. Se ni

sukcesos, radio kaj televido en Nederlando donos atenton al nia iniciato por stimuli aliajn organizaĵojn kaj movadojn imiti nin. La iniciatinto estas firme konvinkita, ke tiamaniere ni altgrade honoros la aŭtoron de Esperanto, kiu dediĉis sian vivon al la okulmalsanuloj kaj al la internacia lingvo.

### Esperanto-kurso en Leiden.

Pro la diversaj artikoloj en la gazetoj okaze de la akiro de la Supera Diploma de Benata Koopmans tuta klaso de M.U.L.O.-lernejo en Leiden anoncis sin por la kurso en Esperanto.

La familio Koopmans antaŭvidas tre okupatan vintron en la poresperanta laboro.

### Ferio en Ĉeĥoslovakujo.

Kiel nederlanda gasto mi vizitis la Smeran Esperanto-Tendaron (SET) en ĈSSR. SET sendis antaŭ unu jaro invitilon por junul(in)o al LEEN kaj LEEN, ĉar estis por junul(in)o ĝis 25 jaroj, transdonis ĝin al NEJ.

La tendaro okazis en Lančov, nur malgranda vilaĝo proksimume 20 km. norde de la aŭstra limo, en la distrikto Znojmo. Estis ĉeĥa tendaro kun kelkaj eksterlandaj gastoj, inter alie el Svisujo, Pollando, Orient-Germanujo. Jugoslavujo kaj Nederlando.

Matene ni ĉiuj sekvis la kursojn (kvar diversgrandajn) kaj posttagmeze ni povis amuzi nin per sporto kaj ludo. Ni povis promeni en la arbaro, naĝi en la lago k.t.p.

Okazis unu tuttaga ekskurso per aŭtobuso. Ni vizitis ĉe Breclav elfosajojn kie estis multaj skeletoj. En Lednice ni vizitis kastelon. En la kastela parko staras unu el la plej nordaj minaretoj. Ni ankaŭ havis du posttagmezajn ekskursojn. Unu al kastelo Vranov en la urbeto Vranov kaj unu al kastelo Bitov kaj ruino Corštejn.

Tien ni veturis per ŝipo kaj reen ni promenis tra la arbaro, laŭ la lago kaj tra la kampoj.

Post dusemajna tendara vivo mi ankoraŭ vizitis korespondamikon kiu ankaŭ loĝas en Ĉeĥoslovakujo.

Neeltje Boersma.

## GRAVA AFERO

Ek de la komenco de oktobro la radio-gazeto „Vrije Geluiden” de la V.P.R.O. ĉesigis la anoncadon de la Esperanto-radio-elsendoj. Pro ŝanĝo de la formo de la gazeto estiĝis spacomanko, kio havis la nomitan efikon.

Ni tamen ne akceptu tion senproteste. La abonantoj petu informojn pri la kialoj kaj esprimu la bedaŭron, ke oni nun ne plu estas informitaj pri la elsendoj.

Ni esperas, ke tiu agado havos la saman efikon kiel pasintjare ĉe A.V.R.O.-bode, kiu jam post du monatoj rekomencis la anoncadon.

### RADIO-SERVO F.E.N.

RADIO BUDAPEST ŝanĝis la ondolongojn kaj nun elsendas ĉiutage de la 20.30a ĝis la 20.45a horo je 13,83 m, 16,77 m, 25,19 m, 30,51 m, 48,10 m, 75,09 m, 240 m (21689, 17890, 11910, 9833, 6234, 3995, 1250 kHz).

W. Böttcher.

## 53-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3—10 aŭgusto 1968

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

### OFICIALA KOMUNIKO

No. 2. Rotterdam, la 9-an de okt. 1967.

**Limdato.** Ni atentigas ke la aliĝoj estas akceptataj ĝis la 25-a de junio 1968.

Aliĝiloj, kiuj atingos la kongresajn perantojn aŭ la konstantan adreson post tiu dato, ne estos traktitaj.

**Infana Kongreseto.** Samtempe kun la Universala Kongreso okazos la 11-a Internacia Infana Kongreseto. Rajtas partopreni infanoj de 6 ĝis 13-jaraĝaj. La kotizo, kiu inkluzivas ĉiujn kostojn dum la tuta semajno, estas 45,— ned. gld.

Informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

**Ekskursoj.** La loka Kongresa Komitato antaŭvidas tuttagajn ekskursojn al Escorial, Segovia kaj Toledo. Kvintaga Postkongreso okazos en Zaragoza. Detaloj aperos en venontaj oficialaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno.

G. G. Pompilio,  
Konstanta Kongresa Sekretario

## TRA LA LIBRARO

*ESPERANTO-ENGLISHDICTIONARY (Esperanta-angla vortaro) kompilita de Montagu C. Butler. Formato 18½ x 13 cm., tole bindita, 450 paĝoj. Eldonis Brita Esperanto-Asocio, Londono. Prezo f 12,50 (50 steloj). Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.*

La vortrezoro de vivanta lingvo regule pligrandiĝas, precipe pro la progreso de la scienco kaj pro la verkoj de kompetentaj literaturistoj. Tio validas, ankaŭ - eble precipe - por la ankoraŭ juna lingvo Esperanto. Estas evidente ke la ekzistanta(j) vortaro(j) uzataj ofte jam dum jaroj, de tempo al tempo devas esti adaptataj al tiu evoluado. Tiel jam en 1955 Waringhien enmondigis sian imponan „Grand dictionnaire Esperanto-français” (granda vortaro Esperanto-franca). Jen ĵus aperigis la akademiano kaj erudiciulo, la grandaĝa angla aŭtoro de diversaj Esperantaj verkoj, Montagu C. Butler, novan belaspektan vortaron. Ricevinte ĝin por recenzo mi memoris pri la prava angla proverbo „the proof of the pudding is the eating” (kies signifo estas: nur sperto kondukas al justa prijuĝo). Sekve en kelkaj monatoj mi regule konsultis la novan verkon dum la legado de multaj Esperantaj libroj kaj gazetoj, serĉante ĉiun ajn vorton, kaj kun kontento mi sciigas ke la enhavo ne seniluziigis min. La riĉa vortrezoro, prezentata ĝenerale kuntekste kun multaj sinonimoj kaj/aŭ klarigoj, precipe el la verkoj de Zamenhof, stampas la novan vortaron kiel iun el la plej bonaj aperintaj ĝis nun. Apud la kutimaj „ĉiutagaj” vortoj abundas botanikaj, zoologiaj, teknikaj kaj geologiaj terminoj, malfacile aŭ tute ne troveblaj en nune uzataj vortaroj. Lerta metodo de mallongigoj (al kiuj tamen oni devas al kutimiĝi dum la uzado) zorgas ke la amplekso restis inter normalaj limoj; alternado de lertiptipoj faciligas la legadon kaj helpas al pli spertaj Esperantistoj la distingon inter oficialaj vortoj, vortoj el la Universala Vortaro aŭ Fundamento kaj tiuj el la Oficialaj Aldonoj. Fine de la libro troviĝas listoj pri geografiaj nomoj (en kiuj Butler, kiel membro, sekvis ĝenerale la provizorajn rekomendojn ĵus publikigitajn de la koncerna komisiono), pri personaj, historiaj, mitologiaj kaj astronomiaj nomoj.

*Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden, Poŝtkonto 7 69 15.*

*Liveras ĉiujn belliteraturajn verkojn, lerno- kaj studlibrojn, vortarojn k.t.p.*

## NORDA PRISMO

*la interesa kultura, socia kaj literatura revuo kvaronjara.*

**Konataj regulaj kunlaborantoj.**

**Abonprezo f 10,—**

Reprezentas Libro-Servo L.E.E.N. - Borniastraat 95 - Leeuwarden.

Poŝtkonto 7 69 15.

En antaŭparolo Butler prave rimarkigas ke vortaro kompreneble estas selektaĵo el la lingva trezoro, ke li prezentis vortojn utilajn al ordinara angle parolanto (mi aldonas: tia selektaĵo ofte montras la preferojn de la kompilanto). Certe tiuj, kiuj legis en la lastaj jardekoj la komentariojn de Butler kaj ekkonis liajn (religiajn) konceptojn rilate uzatajn kaj proponitajn novajn vortojn, ne tuj miros ke li (arbitre) ne mencias diversajn vortojn (ekz. *bideo, hajko, hetajro, kibuĉo, putino, tenebro*) ofte uzatajn. Sed oni sin demandas ĉu tiuj vortoj estas malutilaj al ordinara angle parolanto, kaj ĉu vere utilas vortoj kiel ekz. *doldrumo, keiranto, momordiko, ktp.*? Kaj ĉu puraj anglismoj kiel ekz. *dazli*, instanto estas aprobindaj? Ĝojige estas la forlaso de la umajo *kozo*, vorto miaopinie malakceptinda pro ĝia ĝeneraliga senco. Kelkloke estas rimarkindaj etaj diferencoj inter Waringhien (W) kaj Butler (B), ekz.:

(W) pulovero - (B) pulvoro; (W) kipro - (B) kiperio. Aliloke (B) diferencigas inter vortoj, kiuj laŭ (W) estas sinonimaj: ekz. *ekskludi - ekskluzivi*.

Ne estante angle parolanto mi ne kompetentas prijuĝi la anglajn klarigojn de la vortoj, tamen opinias, ke Butler ne aŭ eble nur malmulte eraris.

Ne estas mirige ke en tia ampleksa verko postrestis kelkaj kompost- aŭ aliaj eraroj, tamen ne ĝenantaj. Gratulojn al la kompilinto, havigante al ni post multjara serioza laborado bonegan ĝisdatan vortaron, kaj por komencantaj kaj por spertaj Esperantistoj, sciantaj (iom) la anglan lingvon. La prezento estas laŭdinda kaj la prezo por tia volumo nepre modera.

P. M.

*VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG, Eld. Fremdlingva Eldonejo, PEKINO, Ĉinio, 1967. 358 paĝoj, 9 x 13 cm. Kun ruĝa plast-kovrilo. Prezo: gld. 1,—.*

Antaŭ ni kuŝas la Esperanto-eldono de la jam famiĝinta „ruĝa libreto” de Maŭ. Fakte ĝi estas antologio de citaĵoj el diversaj paroladoj de la Ĉina prezidanto. Por ni estas malfacile kompreneble, ke tia verko povas servi kiel demonstraĵo en la manoj de miloj da „Ruĝaj Gvardistoj”.

Oni devas tamen pripensi, ke tra la Ĉina historio la skribita instruado estis grava kultura fenomeno kaj ĉiam alte taksata. En ĉi tiu senco la verko daŭrigas malnovan tradicion, samtempe anstataŭigante ĉi tiun tradicion per io tute nova: la marksism-leninismo laŭ ĉina koncepto.

Trafoliumante la verkon kaj legante la „vortojn” de Maŭ, oni povas konstati, ke estas diversaj inter ili, kiuj havas ĝeneralan valoron. Oni kolektis ilin en ĉapitroj, ekz.: „La Komunista Partio”, „Milito kaj Paco”, „Servi al la Popolo”, „Disciplino”, „Lernado”, k.t.p.

Sajnas al ni, ke ĉiu povos samopinii kun reguloj kiel: „Redonu ĉion prunteprenitan” kaj: „Ne domaĝu plantojn”. Oni mem juĝu pri la ĝeneralvaloro de „Ne flirtu kun virinoj”, ankaŭ unu el la „Ok Punktoj de Atentigo” en la ĉapitro „Disciplino”.

Estas certe, ke vastaj tavoloj de la Ĉina popolo ricevas tiel nemalestimindan edukadon.

Plej granda parto de la donita instruado temas pri la komunisma doktrino. Maŭ certe ne parolas pri „paca kunezistado”: „La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi problemon per milito” (p. 69). Ankaŭ en ĉi tiu senco la verko povas esti instrua por ni.

La lingvo estas klara kaj bona. Sur p. 127 mi trovis du esprimojn neklerigitajn: *Jan-an* kaj *Hi-an* (?). Verŝajne mankas Esperanto-ekvivalentoj.

H. G.

## RIMARKINDA VERKO \*

Jam en sia inaŭguracia parolado Prof. G. Hamming pruvis, ke li havas tre originalajn ideojn pri la biblia mesaĝo (vidu „N.E.”, dec. 1962).

Nun aperis de li ampleksa verko - nederlandlingva - de 208 paĝoj. Kompreneble ne estas mia intenco en la kadro de mallonga artikolo kritike priparoli ĉi tiun verkon. Mi ne sentas min sufiĉe kompetenta por tio.

Laŭ mia opinio la verko tamen meritas esti publike indikita en „N.E.”, ĉar ĝi estas ankaŭ por Esperantistoj rimarkinda libro. La aŭtoro en ĉapitro IV (La kompreno de tekstoj el alia kulturo) ne nur detale citas el „Lingvo kaj Vivo” de Prof. Waringhien, sed ankaŭ estas presita sur la antaŭlasta paĝo de la kovrilo Esperanto-poemo de Baldur Ragnarsson - jam sufiĉe rimarkinda en nacilingva verko - kaj krome la lingvaj problemoj ludas gravan rolon en la argumentado.

La verkinto, profesoro pri la kristana sociologio ĉe la Agrilkultura Altlernejo en Wageningen, priskribas en sia verko Abrahamon (Abram) kiel kulturkritikiston. En Genezo, laŭ prof. Hamming verkita de Abrahamo, kaj ne de Moseo, Abram donas kritikan raporton pri la kulturhistorio de Mezopotamio kaj de Egipto, rigarditaj de li kiel unu kulturregiono, al kio Abram aldonas vizion pri la estonteco (i.a. p. 113).

Multaj, edukitaj kun pli malpli tradicia rigardo al la mondkreada historio, eble opinios ĉi tion fantazia spekulacio, pli influata de la profesio de la verkinto ol de scienca esploro. Sed tamen oni devas konfesi, ke ofte estis necese forlasi la konvencian vojetojn por trarompi al iu nova spirita vojo.

Kiam Prof. Hamming ekzemple interpretas la konatan historion de Kain kaj Habel kiel konflikton inter organizita, teĥnika, terkultura ŝtato kaj la ĉirkaŭantaj popoloj de brutbredistoj, kiuj pro la ekspansio de la terkulturistoj estis senigataj de siaj paŝtejoj, li komperas tion kun la rilato inter la teĥnike altevoluintaj modernaj ŝtatoj kaj la subevoluintaj landoj.

Per tiu ĉi ekzemplo mi ankoraŭ tute ne laŭvalore pritraktis la enhavon, riĉan je valoraj ideoj. Mi nur aldone atentigas al la paĝo koncerne la ideojn de Abram pri la monogamio (p. 106), kaj al la paĝo, kie la verkinto priskribas la agadon de

A. Arkanow

## FLAVA SABLO

- Iru, ni sidigu tie, ŝi diris.
- Ne, ni iru al la benketo, li diris, - tie estas sablo. Ili sidis kune sur la benketo. Li desegnus ion enpensiĝinta per bastoneto sur la sablo.
- Kion vi desegnas?
- Vin.
- Mi ne similas.
- Tio ne gravas.
- Estis malfacile desegni. La sablo disŝutiĝadis kaj estis seka.
- Ho, rigardu, aflugis majskarabo.
- Ĉi estas ino.
- De kio vi scias tion?
- Viraj majskaraboj ne flugas tiel malalte.
- Ekblovus vento kaj forviŝis ŝian portreteton el la flava sablo.
- Ni venu morgaŭ al la sama loko, bone, ĉu?
- Bone.

Li ne venis la sekvan matenon. Ne alvenis ankaŭ postmorgaŭ kaj post unu monato. Li venis jam neniam . . . Ofte ŝi sidis solece sur la malgranda benketo. Sola. Ŝi konsideris kaj ne povis kompreni, kial li ne venas. Ŝi ne scias, ke la gepatroj ŝanĝis al li antaŭlernejon . . .

(*Pola Esperantisto, marto/aprilo 1967*).

Dio en la historio kiel juĝon pri la sociekonomia agado de la homoj (p. 124 kaj 125).

La verko volas kontribui al dialogo inter la eklezio kaj ne-eklezianoj. Oni povas supozi ke la religio enhavas elementojn, ĝis nun kaŝitajn, kiuj tamen povus esti valoraj en la nuntempa socio.

Prof. Hamming venis al la konvinko, ke la biblio ne parolas pri kreado kaj unua peko, sed pri abramismo: socikultura movado, kiu pledas por internacia politiko, bazita sur solidareco kaj memkritiko. Kiu havas iom da afineco al tiaj ideoj, ne pripentus ke li legis ĉi tiun verkon.

H. G.

\* *Dr. Ir. G. Hamming: Abramisme. Bijbelse beschouwingen over een moderne stroming in de oudheid. Eld. H. Veenman & Zn., WAGENINGEN.*

Malgranda vorteto, sed kaŭzanta grandan embarason, eĉ al lingve spertaj esperantistoj. Zamenhof konsideris ĝin prepozicio; ĝi do postulas nominativon. Tamen, la fakto ke akuzativon post *po* li ne malaprobis, pravigas tiujn kiuj preferas uzi post ĝi akuzativon, do evidente konsideras *po* adverbo. Por ĝia adverbeco pledas ankaŭ ke *po* estas ofte anstataŭigebla per alia adverbo: *individue, minimume, maksimume, proksimume, jam, nur, eĉ*. Ĝis nun tiu afero restas por ni ne solvita. Nekontentige solvitaj estas ankaŭ la malfacilaĵoj kiujn *po* prezentas. Mi jam demandis al mi pro kio nuntempe tiom multaj kompetentuloj fuŝas monon, tempon, paperon, iafoje eĉ reputacion, por persisti en sia pravo koncerne la en vero nur bagatelan demandon pri ata/ita, anstataŭ servi al la esperantistaro per serioza esplorado pri la tikla *po*-problemo.

Tiu ĉi problemo denove okupis min post tralego de du cirkuleroj de Hermann Wagner, Keplerstr. 87, 851 Fürth i. Bay, Okc. Germanio. Sur 12 paĝoj s-ro W. serioze traktas la aferon, bedaŭrinde en tiom kompakte skribita maniero, ke la tralego postulas multan penon al la okuloj.

Post funda studado la aŭtoro venis al la jenaj konkludoj:

- 1e. la Zamenhofa regulo pri *po* estas por la pli multaj esperantistoj tro fremda kaj malfacile digestebla;
- 2e. la uzado de *po* kontraŭ la Zamenhofa regulo fariĝis jam populara;
- 3e. kvankam ne estas necese kondamni la fundamentan uzadon, oni povas senĝene apliki la popularan uzadon.

Kiel li pravigas tion, li klarigas per detala rezonado kun ekzemploj. Kiuj interesiĝas pri tio, mendu la cirkulerojn ĉe s-ro W.

Evidente ili estas senpage riceveblaj. Malgraŭ lia tre serioza kaj detala pritraktado mi ne povas akcepti lian solvon.

Mi preferas la Zamenhofan regulon, eĉ malgraŭ la fakto ke por okcidentanoj ĝi estas fremda, ĉar en niaj lingvoj oni vane serĉas ekvivalenton por la Esperanta vorteto. En sia „Struikelblokjes” d-ro H. C. Mees jam en 1929a donis klaran metodon por solvi la malfacilaĵojn. En mia „Konsilanto pri la Esperanta gramatiko” mi dediĉis kvar paĝojn al la afero, preninte la klarigon de Mees kiel bazon.

Laŭ tiu klarigo oni distingu en frazoj kun *po* du nociojn: certan unuon, kaj kvanton kiu rilatas al tiu unuo. Se tiu unuo estas persono (elk, ieder, per man) aŭ afero (per stuko), oni *ne* traduku tiujn vortojn. Se tiu unuo estas indikita per alia vorto, ekz. metro, skatolo, kesto, sako, grupo, funto, linio, vorto, horo, tago, jaro, kilometro k.m.a., oni *ne* traduku per *po*, sed per alia konvena prepozicio: *en, dum, por*. *Po* oni do *ne* uzu antaŭ la nomita unuo, sed antaŭ la kvanto rilatanta, komplemantanta tiun unuon, do kie oni nederlande ne uzas prepozicion. *Po* do ne estas la traduko de la nederlanda *per*. Jen kelkaj ekzemploj ilustrantaj la Zamenhofan regulon (la unuoj estas kursive presitaj):

Ili ricevis *po* 5 guldenoj (unu = ĉiu el ili). Anoncoj kostas *po* duona guldeno por *linio*. La prezo de la cigaroj estas *po* 30 cendoj (unu = unu cigaro). Oni peisis la kafon en *sakoj* *po* duona kilogramo. Li veturis *po* 60 kilometroj en *horo*. Ili marŝis en *grupoj* *po* ses. La drapo kostas *po* 5 guldenoj por *metro*.

Rimarkinde estas ke en pluraj kazoj oni klare povas esprimi la saman nocion ankaŭ sen *po*, ekz.: La salajro estas 2,50 g. por horo. La prezo de anoncoj estas duona guldeno por linio. La cigaroj kostas 3 g. por skatolo.

Mi koncedas ke ofte oni trovas frazojn en kiuj la uzo de *po* ŝajnas tute kontraŭa al la ĉi supra regulo; kaj per tiu fakto oni kelkfoje volas pruvi ke ankaŭ la inversa uzo de *po* taŭgas, ekz. en: Oni vendas ŝuojn *po* paroj. Same: vendi ion popare, podetale, pogrande, *po* iom. Sed ĉi tie la ŝajno trompas, ĉar en vero en tiuj frazoj la supre nomita unuo nur ne estas menciita, kaj la adjekto *po* paroj do fakte estas la kvanto de ĉiu vendo (ĉiu vendo ja estas la nenomita unuo).

La senco de *po* estas distribua, t.e., ĝi distribuas ian nocion: prezon, mezuron, tempon k.c. inter certaj grupoj da personoj aŭ aferoj. Sed tio ne signifas ke oni ĉiam *devas* uzi *po* en ĉiuj ĉi esprimoj. Ofte oni povas ellasi *po*, ne ŝanĝante la signifon de la frazo, ekz.: Li veturis *po* 100 kilometroj en horo - Li veturis 100 kilometrojn en horo. Oni eĉ trovas *po* en frazo en kiu la sama nocio jam estas aliamaniere indikita, ekz.: Li veturis ĉiuhore *po* 60 kilometroj (*ĉiu-* kaj *po* indikas la saman nocion; la frazo do estas pleonasma.

S-ro W. pledas por libera uzado de *po*, do ne kondamnante la regulon de Zamenhof, tamen pravigante la inversan metodon. Li do ne faras striktan diferencon inter la unuo kaj la kvanto en unuo. Mi koncedas ke ni facile povas elpensi frazojn en kiuj tiu diferenco ne okulfrape reliefigas, sed ĉu ni, klarigante la signifon de iu nocio, lasu nin gvidi per ekzemploj kiuj tuŝas la limon de l'ideo? Konsiderante plurajn aliajn prepoziciojn: *de, da, kun, per, pro, por, dum, en* k.a., ni konstatas oftege ke iliaj nocioj ne estas rigore limigitaj, sed kvazaŭ kunfluas unu en alian. Tiukaze ni havas personan elekton; kial do ne ankaŭ koncerne *po*? Se ni troviĝas antaŭ la alternativo elekti ekz. inter *dum* kaj *en*, tiu fakto ja ne prezentas motigon por intermiksi ambaŭ prepoziciojn ankaŭ en aliaj, pli evidentaj kazoj! Nu, se ni troviĝas en dubo kiu el la du nocioj estas la unuo, kaj kiu la kvanto en unuo, ja ne gravas kie uzi *po*, ĉar ankaŭ la leganto tre verŝajne ne povas konstati ĉu *po* estas laŭregule aŭ inverse uzita! Sed sincerdire mi ankoraŭ neniam renkontis *po*-frazon en kiu la du nomitaj nocioj ne estas diferencigeblaj.

*Po* ĉiam restas al ni fremda, precipe pro tio ke ĝi ne havas en nia nacia lingvo ekvivalentan prepozicion. *Po* havas slavvan originon; kaj eĉ en la slavaj lingvoj

*po* havas ne unu, sed plurajn signifojn; granda rusa vortaro mencias eĉ 14 plej diferencajn signifojn. Mi konjektas ke kontraŭregula uzo de *po* estas same fremda al slavlingvanoj kiel la regula uzo al okcidentanoj. Ke Zamenhof elektis por Esperanto ĝuste *po*, restas por ni enigmo. Verŝajne ĝi estas unu mistrafo, volonte pardonebla en lia cetere tiom genie harmonianta lingva sistemo.

Ŝajnas al mi rekomendinde laŭeble eviti ĝian uzadon, ne por iri laŭ la vojo de minimuma rezisto, aliavorte por eviti malfacilaĵojn, sed nur por eviti pleonasmojn, kaj por ĉerpi el la aliaj ebloj kiujn Esperanto prezentas por indiki la saman nocion, iafoje eĉ pli klare ol per *po*. Kvankam ne samopinianta kiel s-ro W., mi konfesas ke li faris tre utilan laboron, atentigante kompetentulojn pri la embaraso, ofte kaŭzitaj de *po*. Espereble tio kontribuos al normaligo de la *po*-uzado, por kiu ni nepre bezonas klaran direktivon.

G. J. Degenkamp.

#### KATOLOGO DE LA HUNGARLANDA ESPERANTO-BIBLIOTEKO.

En la kadro de konata publika muzeo en Szeged (Hungarujo) malfermiĝis en 1960 Esperanto-biblioteko, celanta kolekti kaj konservi materialon pri mondhelpingvaj provoj, fari bibliografian laboron rilate al interlingvistiko kaj Esperanto, aranĝi ekspoziciojn ktp. El la tuta mondo oni ricevis jam ampleksan materialon, tiel ke eldoniĝis speciala katalogo stencilita, formato 9 x 20 cm, 288 paĝoj kun indeksoj alfabetaj kaj de la eldonlokoj.

Oni klasifis la erojn laŭ la Universala Decimala Sistemo en proksimume 150 fakgrupoj. Trafoliumante la katalogon oni estas surprizata de la riĉa kolekto, inter kiuj multaj malnovaj elĉerpiĝintaj eroj. Aliflanke tamen mankas multaj lastjaraj eldonoj, kiujn la muzeo espereble iom post iom povos havigi al si.

P. M.

#### „Winnie-the-Pooh” en Esperanto

La tre ŝata angla infanlibro „Winnie-the-Pooh” de A. A. Milne jam aperis en multaj tradukoj. Nun ekzistas bona Esperanta traduko, kiu aperos, se sufiĉe da antaŭmendoj atingos Esperanto Information Centre, 156 Fifth Avenue (821), NEW YORK, N.Y. 10010, Usono. Skribu tuj!

#### HEROLDO DE ESPERANTO

la sola ne-asocia neŭtrala Esperanto-gazeto, ĉiam aktuala.

18 numeroj jare.

Jarabono f 15,—

Reprezentas Libro-Servo L.E.E.N. - Borniastraat 95 - Leeuwarden.

Poŝtkonto 7 69 15.

## ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENO-KOMITATO

S. 1. (Taskoj 1967).

Traduku:

### Malnovaj vortoj pri novaj vortoj.

„Esperanto”, diris elokvente Edmund Privat, „estas vivanta lingvo de vivanta popolo”.

Trafa, kaj tute vera estas tiu ĉi formulo. Nia lingvo vivas, ĝin oni ne rajtas konsideri kiel ian maŝinon, kies diversaj partoj kaj pecoj estas laŭvole ŝanĝeblaj aŭ eĉ forigeblaj.

Kun respekto, kun pia respekto, ni devas ĝin trakti ne nur ĉar ĝi estas internacia komuna lingvo, ĝi estas propra apartenaĵo de neniua nacio, de neniua eĉ plej arta, plej scienca personaro aŭ persono, sed ankaŭ pro tiu speciala delikateco, kiun ĝi ŝuldas al sia viveco mem.

Ĉu niaj vivantaj naciaj lingvoj evoluas, pliriĉiĝas per tio, ke teoriemuloj kaj vortaristoj endondukas en ilin amase plimalpli taktplene, la de ili deziratajn plibonigojn, ŝanĝojn aŭ novaĵojn?

Ĉu ĉar tion neniua kuraĝas fari, niaj naciaj lingvoj ŝtoniĝas, ĉu ili ne plu vivas, ne plu evoluas? Certe ne!

Sed alimaniere okazas la evoluado, la pliriĉiĝado. Ili rezultas precipe de la agado de verkistoj, kiuj profunde, pie amas sian lingvon kaj kvazaŭ kun timo, nur post longa kaj severa pripensado, uzas fine novan vorton, sole ĉar alimaniere ili tute ne povus esprimi ian ideon.

La „belaj spiritoj” skribis la fama franca aŭtoro Montaigne (dekkvara jarcento) ne alportas en la lingvon (novajn) vortojn, sed ili pliriĉigas la siajn, donante al ilia signifo kaj uzado pli da pezo kaj da profundo . . . kaj tion ĉi singardeme kaj sagace.

Ni same agu kun nia esperanta lingvo. Ĉiuj ĉesu ĝin konsideri kiel artefaritajn riparotajn kaj plenigotajn. Ĉiuj agu respekte al ĝi, kiel al sia gepatra lingvo!

Neniua, eĉ la plej konservema, malpermesas al aŭtoro, precipe al konata aŭtoro, krei novan vorton, se ĝin li nepre bezonas. Sed de ĉiuj ni rajtas postuli, ke nova-

ĵon oni neniam enkonduku por la gloro aŭ plezuro ĝin enkonduki, ĉar verdire, gloro tio ne estas, kaj por neniua tio devus esti plezuro.

Th. Cart,

(Antaŭparolo al „Du paroladoj” de Edmund Privat, 1911).

S. 2. Traduku (10.00—12.00 h.):

### Benelux.

Niet alleen in de Organisatie der Verenigde Naties toont Nederland zijn bereidheid tot samenwerking met andere staten.

Zulk een samenwerking, in hechte en innige vorm, is groeiende met onze zuidelijke burenen, België en Luxemburg.

Er is reeds vroeger een tijd geweest, dat de noordelijke en zuidelijke Nederlanden in één staat verenigd waren. In de loop der geschiedenis is die band verbroken en er is zelfs een tijdelijke vijandschap voor in de plaats gesteld.

De vijandschap zijn we al lang te boven en er worden thans pogingen gedaan de drie landen België, Nederland en Luxemburg (Benelux) tot nauwe samenwerking op velerlei gebied te brengen.

Eén groot industriegebied, één groot landbouwgebied, één verkeerscentrum van belangrijke betekenis, één belangrijke handelsmacht - dat kan de Benelux zijn. De Benelux betekent een eerste praktische stap om langs democratische weg, langs de weg der vrijwilligheid, te geraken tot samenwerking tussen enige staten. Nederland weet, evenals België en Luxemburg, dat de ontwikkeling in de wereld vraagt om een nieuwe groepering der staten, om meer eenheid en samenwerking, ook al zou daarbij een stuk van de eigen soevereiniteit moeten worden prijsgegeven.

Alleen samenwerking tussen de staten kan Europa de redding brengen uit de moeilikheden, waarin het thans verkeert. De tijd, dat west Europa het belangrijkste economische en beschavingsgebied ter wereld was, schijnt voorbij. Schijnt . . . maar het hoeft niet zo te zijn. Mits wij de verscheurdheid van west Europa maar

## GEOGRAFIAJ NOMOJ EN ESPERANTO

(daŭrigo de la artikolo sur p. 94).

bon Orel, kies rusa proponco estas Arjol. Ankaŭ france kaj angle la transliteracio estas Arjol, sed francoj, angloj kaj nederlandanoj tamen diversmaniere prononcas Arjol. Feliĉe ili ĉiuj skribas Orel, kaj legante Orel, ĉiu scias pri kiu urbo estas parolo. Do Arjolo ne taŭgas en Esperanto! Ĉu do Orelo?

Kiel la ĉi supra ekzemplo montras, el simpla transliteracio povas estiĝi kelkfoje Esperanta vorto kiu havas jam alian signifon. Jen ankoraŭ kelkaj tiaj ekzemploj: Vere - Vero, Vaals - Valso, Monster - Monstro aŭ Monstero, Capelle - Kapelo, Cuyck - Kuko, Weesp - Vespo, Doorn - Dorno, Mook - Moko, Leon - Leono - Bordeaux - Bordo, Gotha - Goto, Vianden - Viando, Toul - Tulo, Ulm - Ulmo. Nun estas klare kial la aŭstriaĵ esperantistoj por sia ĉefurbo Wien ne elektis Viono, sed Vieno! Sed kiel ni nun traduku la francan nomon Vienne?

Eĉ nur iomete kontentiga esperantigo de lokaj nomoj estas verŝajne neniam realigebla. Sed kial la esperantistoj pro tio rompus al si la kapon?\*. Jam sufiĉas se ni povas disponi pri la Esperantaj nomoj de internacie kaj historie gravaj landpartoj, maroj, riveroj, lagoj kaj ĉefaj urboj. Ni ne risku elpensi kriplajojn por ĉiuj urboj, vilaĝoj aŭ aliaj negravaĵoj. Esperanto ne estas komparebla kun biologio, en kiu ĉiu besto kaj vegetaĵo nepre devas esti per scienca nomo registrita en ĉiujn ampleksanta nomenklaturon.

Jam en 1907 komisiono de la L.K. aperigis raporton pri propraj nomoj, inkluzive de geografiaj nomoj. Rimarkinda estas en tiu raporto la preskaŭ unuanime aprobita gvidanta principo: „Oni devas lasi kiel eble plej zorge al ĉiu propra nomo ĝian fizionomion, skribante ĝin laŭ nacia ortografio, kiam eble, aŭ transskribante ĝin fonetike, kiam ĝi devenas de lingvo, kiu uzas apartan (t.e. ne-latinan) alfabeton. Oni devas ĝin esperantigi nur kiam oni ne povas agi alimaniere; tia es-

perantigo estas malbonaĵo kiu, okaze, povas montriĝi necesa, sed kiun oni evitos laŭeble”. Pri tio la komisionano s-ro L. E. Meier memorigis la trafan parolon de Goethe: „La nomo de homo estas lia vesto, kaj neniua havas la rajton ĝin difekti!”. Tio sama validas pri nomoj de urboj.

Ni ne supozu ke normaligo de geografiaj nomoj estas speciale Esperanta afero. En 1962 „Nederlanda Esperantisto” menciis en sia maja numero, ke en 1963 okazos en Amsterdam la 8a Internacia Kongreso de Nomscienculoj, por veni al ia normaligo de geografiaj nomoj. Speciala komisiono de Unesco intencis prilabori la sciencan materialon rezultantan el tiu kongreso. Bedaŭrinde ni nenion eksciis pri la rezultato.

Nur pri tio ni povas esti certaj, ke kontentiga normaligo de geografiaj nomoj havas plenan atenton en scienculaj rondoj. Ĉiu nova eldono de atlaso metas la kompilantojn antaŭ la saman problemon: kiel plej praktike kaj efike prezenti en ĝi la nomojn. Internacia kongreso de geografoj, okazinte jam en 1871, en Antwerpen, rekomendis agnoski la naciajn nomformojn de ĉiu lando. Post tiam oni kelkfoje ripetis tiun ĉi sugeston, sed pasis 90 jaroj ĝis kiam venis la unua rezultato: nur en 1961 aperis „De Grote Wereldatlas”, eld. Wolters, Groningen, en kies enkonduko d-ro F. J. Ormeling menciis, ke en tiu eldono ĉiuj geografiaj nomoj estas prezentitaj en la respektivaj naciaj lingvoj, kaj en la internacie validanta ortografio. Eĉsepton formas la nomoj en aliaj alfabetoj ol la latina, ekz. araba, ĉina k.t.p., por kiuj nomoj oni elektis internacie rekomenditan sistemon de transliteracio.

Per tiu decido oni venis al kontentiga solvo de problemoj ĝis nun okupinta la geografojn jam dum preskaŭ jarcento. Tio estas simpligo kiu por ni, esperantistoj, estu ekzemplo kaj averto: ke ni ne klopodu eltrovi por la mil-miloj da naciaj nomoj ankaŭ Esperantan formon. Tion farante ni ne plisimpligus la aferon, sed male: ni plimalimpligus ĝin. Kaj malimpligo ne estas konforma al la tendenco de Esperanto!

G. J. Degenkamp.

## SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccama-singel 294, Groningen. Poŝtĝirkonto: 81 58 89

weten te overwinnen en het tot nieuw leven weten te wekken. Nieuw leven door samenwerking.

Benelux is de eerste stap in die richting.

El: Burgerschap en Burgerzin.

\* Vidu tamen „N.E.” de oktobro 1967, p. 90, kun informo pri decido de la Internacia Geografia Asocio dum la U.K. en Rotterdam (red.).

## **NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Aganta prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.  
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.  
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).  
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.  
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

## **KONCIZE**

### **Ukraina antologio.**

En KIEV Esperantistoj preparas „La Esperanto-Antologio de Ukraina poezio”. Oni petegas trarigardi malnovajn E-revuojn kaj sendi tradukojn el ukraina lingvo (prozo kaj poezio) laŭ adreso: USSR, KIEV-57, Poje 9, klubo „Esperanto” Jaroslav Matvijšin.

### **Instrui en Afriko.**

Ĝus aperis nova broŝuro de Unesko „Teachers for Africa” (Instruistoj por Afriko), kiu detaligas vakajn oficojn por instruistoj en mezgradaj kaj altaj lernejoj kaj universitatoj en 21 afrikaj landoj. Ĝi estas la sesa eldono en serio, kies celo estas helpi la afrikajn Ŝtatojn-Membrojn de Unesko varbi instruistojn el eksterlando.

La broŝuro konsistas el du partoj. La unua listigas 139 landajn agentejojn aŭ organizaĵojn, kiuj okupiĝas pri instruado eksterlande kaj al kiuj la instruistoj povas turni sin por ricevi informojn. La dua parto prezentas la vakajn oficojn en la 21 landoj. Tie troviĝas informoj pri kvalifikoj bezonataj, metodo de kandidatigo, kondiĉoj de laboro, lingvo de instruado ktp.

La broŝuro „Teachers for Africa” estas senpage ricevebla ĉe Unesko (Dokumentoj kaj Publikadoj), Place de Fontenoy, F-75-Paris (7e).

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

### **Esperanto-Asocio atakos lingvan diskriminacion**

Universala Esperanto-Asocio, la monda

organizaĵo por la Internacia Lingvo, planas ampleksan agadon okaze de la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj 1968, deklarita de Unuiĝintaj Nacioj. La Asocio, kies Centra Oficejo troviĝas en Rotterdam, aparte atakos la multespecajn formojn de lingva diskriminacio, kiun specife kondamnas en sia 2-a artikolo la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kiel unua paŝo, ĝi reeldonis kaj distribuas tra la tuta mondo la Esperantan tekston de la Universala Deklaracio, kiu ĝis nun aperis entute en 61 lingvoj.

### **Kongreso de astronomio-amatoroj Esperantistaj**

La Popola Astronomia Observatorio de la urbo ZILINA, Ĉeĥoslovakujo, preparas kongreson en 1968. Unu el la celoj estos la preparo de komuna Esperantobulteno por diskonigi la ĝisnunajn rezultojn de la laboro de amatoroj. Ankaŭ oni celas la preparon de Esperanto-astronomia vortaro.

Fina celo estu la regula eldono de publikajo: „Astronomiaj Informoj” Interesiĝantoj sendu siajn adresojn al Ludová Hvezdáreň Mesta Ziliny, Ĉeĥoslovakujo.

### **KORESPONDPETOJ**

Vlajo Ivanov Vlaev, 21-jara, studento, dez. kor. Adreso: kv. Palauzovo-str. Prolet 10, GABROVO (Bulgarujo).

Gyarmathy Zsolt, GYULA, Szegedi Kiss István u 18, Hungario, fakinstruisto de geografio, biologio kaj Esperanto, dez. kor. pri E-literaturo kaj naturscienco. Estas ankaŭ filatelisto.

25-jara profesorino Sarolta Sudár, Déry-né u. 28, PECS, Hongarujo, dez. kor.

